

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 4

Septembro/Oktobro 1970

## Ni invitas al Darmstadt

### Sonderstempel zum Esperantokongreß in Darmstadt

#### Provizora programo

**Ĵaŭdo, la 8a de oktobro**  
Gazetara konferenco,  
malfermo de la ekspozicio

**Vendredo, la 9a de oktobro**  
Kunsido de la GEFA-estraro

**Sabato, la 10a de oktobro**  
7—12 h

Akceptejo antaŭ la stacido  
domo poste en Justus-Liebig-Haus  
9 h

Unua aŭtobus-ekskurso tra  
urbo kaj ĉirkaŭaĵo (2-3 h)  
12.30 h

Tagmanĝo en la kantino  
14 h

Kunsido de GEFA-estraro  
kaj distriktkomisiitoj  
(nepublika)

14 h  
Lingva ekzameno, skriba  
parto (nepublika)  
15 h

Dua aŭtobus-ekskurso tra  
urbo kaj ĉirkaŭaĵo (2-3 h)  
19.45 h

Salutvespero kun varia  
programo, poste dancado

**Dimanĉo, la 11a de oktobro**  
9 h

Lingva ekzameno, buŝa  
parto (publika)  
10 h

Jarraporto de la GEFA-  
prezidanto, kolorfilmoj  
(Prag, Rimini)  
12.10 h

Tagmanĝo en la kantino



**Trafiksituo.** Darmstadt situas je la kruciĝo de la federaciaj stratoj B 3 (Frankfurt—Heidelberg) kaj B 26 (Mainz — Aschaffenburg) kaj du aŭtoŝoseoj kruciĝas je la urba periferio: Hamburgo — Basel (E 4) kaj Köln—Heidelberg. Nur 20 km estas la distanco ĝis la flughaveno Rhein-Main (Frankfurt). Darmstadt estas grava fervojnodo sur la nordsuda magistralo de la Federacia Fervojo. Tramlinio kondukas eksterurben al Bergstraße (Seeheim—Jugenheim).

Die Anmeldevordrucke sind inzwischen verteilt worden. Nachforderungen sind an die Bezirksbeauftragten zu richten.

#### Eisenbahnmotivstempel in Darmstadt

Vom 9. — 11. Oktober 1970 wird die Vereinigung Deutscher Eisenbahner-Esperantisten ihren Jahreskongreß in Darmstadt abhalten. Anlaßlich dieser Veranstaltung im Justus-Liebig-Haus wird am 10. Oktober ein Sonderpostamt von der Deutschen Bundespost eingerichtet, das einen Eisenbahnmotivstempel führt und besondere Einschreibnummernzettel mit dem Vermerk „GEFA-Jarkunveno“ verwendet. Im Stempel ist unter dem Emblem der Eisenbahner-Esperantisten die Zeichnung einer Dampflokomotive der Baureihe 065 angebracht. Besondere Festpostkarten werden aufgelegt: Preis mit Sonderstempel = 0,50 DM, mit besonderem R-Zettel = 1,30 DM. Bestellungen durch Einzahlung auf das PS-Konto Frankfurt Nr. 3030 22 (G. Bublitz, Frankfurt) sollen rechtzeitig erfolgen. Die besonderen R-Zettel sind nur während der Dauer des Sonderpostamtes erhältlich.



## Marĝene pri la 22-a

Retrospektive kaj jam kun iom da distanco, kiu ja orumas ankaŭ neagrablajn memorojn, jen fine elkoviĝas kiel lasta ankaŭ nia raporto pri la 22-a kongreso, vere malpli serioza babilo, marĝenaj notoj apud severe oficialaj raportoj. Sed malnovaj kongrespartuloj scias, ke ĝuste la sennombraj, ŝajne bagatelaj okazaĵoj ĉe la rando de la granda evento kreas la etoson, estas la spico en la kongresmenuo. Cetere la plej aktualan raporton komunikis ĉiam la modelefunkcia gazetara servo, kiu jen kaj jen povis sciigi novaĵo eĉ antaŭ la okazo.

### 701' fervojistoj kongresis en Rimini

„Bonŝancon vi havis“ gratulis la matenkafon portanta litvagon-konduktoro duonhoron antaŭ Bologna, „ĉar hieraŭ la vojaĝantoj devis pasigi la nokton en Innsbruck“. Tamen estis venintaj tiun ĉi majon gekolegoj el 19 eŭropaj landoj, fraŭle aŭ kun familioj, al tiu unike bela marbordo salbloza, al la fama banloko adriatika. Ankaŭ la kleriĝema kongresano trovis abundan kampon por historiaj esploroj.

Sed eĉ plej sagacaj LIFKAU-anoj ne sukcesis eltrovi, kiu vere — ne laŭnombre — estis la 701-a kongresano, se entute ili klopodis eltrovi, ĉar ilia agittrupo kelktempe estis tre intense okupita pri certa pilola problemo. Ankaŭ la partimatematiko restis ne ĉiam sen ge-problemo. Ĉi-foje ekzemple Otto + Otto sumiĝas je „sedici“, kiu signifas 16, kvankam sole unu el la Otto-j ĉeestintaj la ge-sidon, laŭ gravo de ofico kaj digno de personeco, ampleksas minimume la duoblon. Ankaŭ tie ne troviĝas la 701-a. Ĉu estis la bona spirito, kiu malgraŭ rigoraj obstakloj semis sukceson kaj kontenton? Aŭ ĉu estis la eta, kobilde ĉiea, Carolina Ceci, la multe amata, ofte fotita pupeto, kiu senĝene ankaŭ aperis kun sia petola ĉarmo sur la inaŭgura podio inter gravmienaj gesinjoroj?

### Por ĉiu kongresano unu ondon

Se en Avignon ĉiu alveninto ricevis salute saketon da ĉerizoj, ĉi-tie en Rimini ĉiu kongresano povis elekti sian propran ondon. La antaŭsezono ne tuj afablis al la fruaj gastoj. Sed post komenca ŝok-temperato la maro tolere varmiĝis por freŝiga bano inter ŝvitigaj kunsidoj. Ne multaj el la 5000 hoteloj estis jam malfermintaj siajn pordojn. Dum la vespera promenado sur la „Viale Regina Margherita“ oni aŭdis ĉefe nur tri lingvojn, inter kiuj ofte dominis Esperanto. Al turistoj neatente pasanta la loka idiomo ŝajnis ia italo-germana. Sed nur mallongdistance flanke de la 20 kilometrojn longa laŭmara aleo, nur 100 metrojn for de ĝi viglas vivo pli indiĝena: jen la senprentenda vendejeto, kie la varo ne tiel loge, sed pli malkare prezentiĝas ol en la tu-

rista regiono, jen la loĝkvartaloj de simplaj homoj afable tolerantaj la interesiĝon de unuopaj fremduloj, jen la modesta „Trattoria“, kien malofte venas turisto, kie post laboro kunestas metiistoj kaj dungitoj por trinki sian glaseton kaj pasie diskuti siajn problemojn aŭ privatajn priokupojn, kiel ĉe ni. Kaj kompreneble en la malnova urbo mem, en la funkcia, administracia, industria, historia centro de unu el la plej frekventataj strandoj en Eŭropo, kie oni nombras la sezonajn gastojn laŭ dekmilionoj, tie renkontiĝas la komerca fervoro de enloĝantoj kun la elspozemo de fremduloj, tie ĉi-tempe koncentriĝas la ekscito de la balotkampanjo kun la malkvieto de sciivolemo. La eksterlandan observanton konfuzas la subtilaj diferencoj inter tiom da nuancoj de laŭta, kolora, multpartia afiŝ- kaj sonbatalo, neniel respektanta la interesojn de fotoamatoroj pri historia arkitekturo, sed demonstranta la plenvivan sudlandan temperamenton.

### Majstra improvizado venkas strikojn

Laŭ fidindaj onidiroj tutcerte la nombro de kongresanoj estus pli granda sen la permanenta strikminaco. 16 tezojn pri „kiel organizi kongreson en Rimini dum antaŭbalota sezono“ oni povas legi en postkongresa raporto (v. IF n-ro 3 / 70 p. 41 „Ĉu vi scias . . .“). Tamen tiu ĉiutage necesa programŝanĝo neprigis pli viglajn personajn kontaktojn de tablo al tablo, de hotelo al hotelo, en la sablo de la marbordo, sur vesperaj bulvaroj, mirakle rapide distribuigis novaĵoj pri la venontaj kongresaranĝoj Kunsidoj, ekskursoj, teatro, eĉ alveno kaj foriro estis absolute necertaj de unu tago ĝis alia. Poŝto, fervojo, gazetaro, ŝoforoj, benzinistoj, ĉu alterne, ĉu kune, decidis nabori kelktempe ŝajne sen verva fervoro, laŭ supraĵa impresoj eĉ kun ioma kontento pri libera tago jen kaj jen. Ke dum kelkaj tagoj kiel sola en la tuta lando funkciis nur nia kongresa poŝtejo, estas certe notinda kuriozaĵo.

Sed la sola trafikilo fidinda restis la „Filibus“, kiu fidele navedis inter la centroj de Rimini kaj Riccione, akurate preter kongresejo, stacidomo, teatro, akcep-



tejo kaj ĉies loĝejoj, laŭ tuta elektra linio senpage uzebla por la kongresanoj. Ruzuloj baldaŭ inventis rafinitajn sistemojn por la trolebuŝtrafiko, kiu en la kongrespaŭzoj kompreneble malkapablis transporti samtempe plurcenton da urĝantaj gastoj.

Ankoraŭ alia institucio ne strikis dum kongreso: Dopolavoro Ferroviario, DLF la itala „BSW“, dopolavoro (postlaboro, -a), kion la germana eble tradukus romantike-gemute per „Feierabend“. Sed DLF ne konis laborfinon dum tiuj ekscitigaĵaj tagoj. La estro de DLF-distrikto Bologna, Pasquale Ceci, la organiza komitato, ges-roj Gimelli kun sia stabo, senlace okupitaj, majstre improvzis por agrablaj la restadon al la kongresanoj, por kiel eble plej amplekse realigi planitajn programerojn, festojn, teatraĵojn kaj ekskursojn. Manko de personaro sentiĝis ankaŭ en la akceptejoj, kiun problemon sperte solvis la ĉefkomitatano kiel fremdlanda gastlaboristo.

Multajn laŭdojn kaj riverencojn ni vidis, aŭdis kaj legis jam pri tiu idealisma, sindona agado. Kion aldoni? Simplan dankon, senpatosan amikan manpremon!

### **Rekordnombroj dum fakprelegoj**

La solenecon de la kongresmalfermo ankaŭ iom ĝenis la konataj obstakloj, kvankam oni trovis indan historian salonon en la palaco Arengo. Inter la longa vico de pli ol 35 parolantoj k-go Zang salutis por la sindikato GdED. La reprezentanto de GEFA ankaŭ transdonis bondezirojn de la oficista kaj la lokomotivista sindikatoj GDBA kaj GDL, salutante samtempe en la nomo de BSW. Li i. a. esprimis la esperon, ke la varma akcepto garantias amikan medion, kaj ke la malvarma maro favoras partoprenon en la fakaj kunsidoj.

Komplementon meritas la diligenta kolegaro, kiu du tagojn poste malgraŭ agrabla akvotemperaturo, spite turismajn logojn, esperige por faka movado, plenigis la prelegosalonegon. 340 aŭskultantoj sekvis la eksplikojn de prof. d-ro Lattanzi pri sekurigo de relnivelaj transtrakaj pasejoj, kiun prelegon perfekte prezentis d-ro De Salvo. Inter la fakfilmoj unu konatigis kiel „Vedette“ la stelmanekonen de FS, la pli ol 200 km/h -rapidan elektro-lokomotivon „Testudo“.

Ĉu menci i ankoraŭ la multajn sociajn eventojn? La interkonan sub obskura lumo, el kiu fine profitis la ĉirkaŭaj restoracioj; la folkloron romagnan, tempera-

mentplene reprezentita de regiona trupo; la vere pretendeman teatraĵon — laŭ lingvo kaj laŭ temo — „La floro nomata Circea“ originale verkita en Esperanto; aŭ la balvesperon en la antikva muelejo, kie fluas abunde la „Spumante“, kie kontraŭe al raporto en unu sindikata organo (fidu iu la ĵurnalistojn!) ne la itala, sed la nederlanda vicprezidanto de FISAIC, d-ro Bieckman, honorigis du meritplenajn kolegojn per oraj medaloj: J. Gießner kaj J. Lok.

### **Inaŭgura bapto en Castel S. Pietro**

En la fama urbo Ravenna nur perforte penetris en la maŭzoleon de Teodorika scivolaĵ vizitantoj minacataj de strikpostenoj. Respubliko San Marino, sur alta roko, ĉi-tempe trankvila oazo en politike malkvieta ĉirkaŭo, ankaŭ geografie efikas pace fortika en monteta ebenaĵo. La lasta tago kondukis la kongresanojn al Bologna; la proksima S. Pietro festis hodiaŭ la inaŭguron de Zamenhofstrato, ne bapata per ordinara ŝaŭmvino aŭ konjako, sed per origina ĉiela beno ĝuste dum la plej solena momento; kvankam iom pluvorente, kiu tamen volas riproĉi la bohan reĝisoran intencon. Digna kongresfino, ĝuinda bankedo, solena fermo, post emocia adiaŭo disiĝas novaj kaj malnovaj amikoj kiel ĉiujare. Jam la 23-a logos nin al Maribor, kie niaj jugoslaviaj gekolegaj atendos nin. Certe ĉi-supraj alineoj ne donas kompletan bildon, sed ili almenaŭ povos kompletigi la legindajn raportojn en IF 3 / 1970 kaj en GER 7/8 / 1970.

### **Dopolavoro en Roma**

Kun denove 12 horoj da malfruo, sed post hezitaj kaj duboj tamen fine alvenis lasta grupo, ankoraŭ ĉ. 80 postkongresantoj en la ĉefurbo, por travivi kelkajn senzorgajn ripozotagojn post kongresa laboro. Bone preparitaj, modele instruitaj la romaj kolegoj akceptis siajn gastojn por lerte, afable, sed senkompate klerigi ilin. Vere semajnan programon en du tagoj, laŭ dankinda klopodo de la restarigita roma grupo, dank' al d-ro Mena bene kaj liaj fidelaj kunlaborantoj, travivis la aliĝintoj; diservon esperantlingvan en Sankta Petro, revidon kun la maljunaj ge-Minnaja, pentrindajn panoramojn desur la romaj montetoj, romiajn, renesancajn, barokajn juvelojn, entute abundon da neforgeseblaj impresoj volonte memoros la vizitintoj de la postkongreso. Arrivederci Roma! Gis revido, geamikoj!

wbr



**Nia veterano Alfred Dawid** festos la 28an de oktobro 1970 sian 75an naskiĝtagon. En Oppeln/Suprasilesio li naskiĝis kaj vivis tie ĝis 1945. Post la unua mondmilito li esperantistiĝis, fariĝis membro de LEA kaj post unu jaro Dawid instruis Esperanton por la kolegaro kaj ties familanoj en la fervoja riparejo Oppeln, kie li laboris en sia metio ĝis la fino de la dua mondmilito. Kun ĝojo li rememoras pri la instruado, kiun li komencis kaj finis per popolkantoj esperantlingvaj.



Alfred Dawid

La urba administracio disponiĝis senkostajn ĉambrojn ĝis 1933. La sekvontajn jarojn ĝis 1945, kiam la movado estis malpermesata, oni devis timi esti arestata. Du junuaj esperantistoj el Oppeln mortis en koncentrejo. Li mem estis ĝustatempe avertita. Fine de la mondmilito la tuta fervojriparejo estis translokigita al Delitzsch kaj Neuaußing. Alfred Dawid kiel senkulpa viktimo de la milito perdis sian

hejmon kaj transloĝiĝis en 1951 kun sia familio al Opladen. Tuj li kontaktis kun fervojistaj esperantistoj el la distrikto Wuppertal, inter alie ankaŭ kun nia tro frue mortinta distriktkomisiito Gerhard Schneider, kaj kune agadis por la disvastigo de Esperanto inter la kolegaro. Nia jubilanto ankaŭ varbis la nuntempan redaktoron de nia Bulteno.

Ekstere de la fervoja medio, dank' al bonaj rilatoj kun la estro de la opladena popolaltlernejo, li varbas tre favore por Esperanto. Ankaŭ post la emeritiĝo li restas aktiva. La nomigo de Esperanto-strato en Opladen povas esti taksata kulmino de lia pli ol 50-jara agado por Esperanto. Kiel nefakulo nia kolego ankaŭ pentras pejzaĝojn kaj portretojn. Tiamaniere li plenigas la liberan tempon. GEFA kaj la kolegaro de la distrikto Wuppertal gratulas tre kore kaj deziras multajn jarojn en bona sanstato.

---

Nur wer sich die Mühe macht den sprachlichen Kontakt mit dem „Fremden“ zu suchen, hat die Möglichkeit, diesen auch als Menschen schätzen zu lernen.

Prof. Dr. Saroles, Universität Edinburgh sagte:

„Ich betrachte das Studium des Esperanto als ein im höchsten Grade philosophisches. Ohne Übertreibung gesagt, kenne ich wenige Studienfächer, die förderlicher für den Geist sind als Esperanto.“ E. K.

## Skisemajno en la francaj alpoj

La 12a Internacia Fervoja Esperanto-Skisemajno okazos de 16a ĝis 23a de januaro 1971 en Chatel. Chatel situas apud la landlimo de Svislando, 40 km for de Thonon — les-Bains. La vilaĝo havas altecon de 1200 mtr kaj estas atingebla per fervojo (linio Bellegarde-Annemasse-Evian). Poste oni veturos per speciala aŭtobuso ĝis la hotelo. La hotelo estas ligna domo, komforta, kun varma akvo, duŝo en ĉiu etaĝo. Ĉambroj kun 2-3-4 litoj. Partoprenantoj maksimume 50 personoj.

Por la skiantoj estas 11 diversaj liftoj je dispono. Piedirantoj havos multajn promenadoblecojn. Adreso de la skisemajno: hotel „La Chaumière“, F 74 Chatel (Francujo).

Prezo por la tuta restado: Kompleta pensio (sen trinkaĵo), speciala aŭtobuso kaj diversaj aranĝoj = 200 frankoj.

Necesas antaŭa pago de 50 frankoj po persono por unu semajno.

La antaŭpago ne estas redonebla, se la aliĝanto ne partoprenas.

Bonvolu anonci vian partoprenon antaŭ la 30a de novembro 1970 al S.ino Josette Bernier

Internacia Fervoja Esperanto Skisemajno  
U. A. I. C. F. 11, rue de Milan, F 75 Paris 9

kaj direkti la pagon al S.ro Edmond Wurmser, poŝtĉekonto 53-17-62 Paris.

Aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la komisiito de GEFA por junularaj aferoj; Bass Klaus Hegenberg, Bf Schée (BD Wuppertal)

---

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / presio: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervoja Asocio.